

& El Ahasvero de amo:

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 696 paŝoj dum 8 minutoj. Verkis K. Kalocsay. Baladigis Martin Strid (2016) per melodio de Drako Longa kaj rekantaĵo de Davida balado.>

(#Melodio:

<1,6:29> (

/mi mire re do dodo dore mimi; mi mire mi mi; soso fami mimi;

(#Rekantaĵe: redo re rere mire do rere re; rere mire doTi LaSo So LaTi do o)

)×24)+

(&Strofoj:

'1 Jen sidas ŝi kun lipoj kunpremitaj, ; Li: kun okuloj dronaj kaj meditaj.

(×: **Bruas danco en halo, dancu en ĉen'** ; **Ĝojaj paŝas ni en esperanto-kunven'**.)

'2 Silento. Tra l' ĝarden' la vent' aprila ; Balaas en la posttagmezo brila

'3 Foliojn postrestintajn de aŭtuno, ; Kiujn ne vekos el la mort' la suno.

'4 Li movas sin kaj ŝi ekspiras ĝeme, ; Kaj ree regas la silento preme.

'5 Kaj en okuloj, kun brilado febra ; Al ambaŭ nun aperas larm' funebra.

'6 Funebras li l' Estinton ĝojofontan, ; Funebras ŝi l' Estonton ne estontan.

'7 El la ĝardeno brila, alfluginte, ; Envenas la Estinto piedpinte.

'8 Ho, temp' ebria de la amo juna, ; Duopoj dolĉaj en la laŭbo luna,

'9 Konfesoj, ĵuroj, kisoj, ĉio multa, ; Mistera, rava, flirta, dolĉe stulta!

'10 Jen, jam el ĉio restis nur memoro, ; Libre premita floro senodoro.

'11 Ho, kial ĝermas floro, se ĝi falas, ; Amor' la vangojn kial forvualas,

'12 Svenema amo kial sin ekmovas ; En kor'? Kial la am', se ĝi ne povas

'13 Eterne daŭri? Ŝi ekspiras ĝeme ; Kaj li kapkline, mute, kompateme,

'14 Kun larme ama sento ŝin rigardas, ; Sed en ĉi sento amo jam ne ardas.

'15 Ho, bone estus kun iama brulo ; En brakojn kapti ŝin por dolĉa lulo,

'16 Karesi al ŝi tra l' harar' konsole, ; Forkisi larmojn de l' okuloj mole,

'17 Sed braketendo nur mensoga pozo, ; Kaj kis' konsola estus nur almozo.

'18 Ne, nepovante doni tutan koron, ; Li ja ne faros tian malhonoron

'19 Al eksreĝin' de ĉiu revo sia: ; Nur sidas li en mut' melankolia.

'20 Silento longa, langa, longa, prema... ; Stariĝas li kun movo hezitema.

'21 Nenia vorto, nur mallaŭta ĝemo, ; Rideto pala, larma. Manopremo.

'22 Mankiso. Star' konfuza, sendecida. ; Rigidaj kruroj. Nun, ekir' rapida.

'23 Sur ŝtupoj. Halto! Ne. Li iras plue. ; En koridor' la paŝoj sonas brue.

'24 Silento. Li foriris sen reveno. ; Ŝi kaŝas siajn vangojn en kuseno.)